# ESPERANTO-SERVO

AKTUALA INFORMA BULTENO DE PRAHA

Vol. 2. No 2 — FEBRUARO 1949

> „La 25a de februaro 1948 estas la mortotago de ĉs. reakcio!"
> *Gottwald*

# *Februaro 1948*

La februaraj okazintaĵoj en la pasinta jaro tute ŝanĝis la publikan vivon de Ĉeĥoslovakio. Temis tiam pri tio, ĉu nia evoluo celos al plifortigo de popola demokratio, ĉu oni faciligos la vojon al socialismo, aŭ ĉu iom post iom oni detruos la avantaĝojn, kiujn gajnis la popolo dum la revolucia jaro 1945. Depost tiu ĉi jaro ĉs. reakcio ne dormis kaj laboris kontraŭ la planoj de la Nacia fronto, kiun formis kvar politikaj partioj. Tiu ĉi politika institucio, kies devo estis laŭ la registara programo de Košice koordinadi la evoluon de nia politika vivo, montriĝis aparato jam ne kapabla fruktodone labori. La Nacia fronto de kvar politikaj partioj komencis detruiĝi. Sed, kiu estis kulpa oni rajtas demandi? Ĉiu estis atakanto al la Nacia fronto?

Kulpa estis ĉs. reakcio, kiu sabotis la laboron de la registaro kaj parlamento. Ankoraŭ oni bone memoras la vortojn de la reprezentanto de estinta naci-socialista partio Dro Zenkl, kiu en Olomouc la 11an de januaro 1948, do tute proksime al la okazintaĵoj februaraj, diris en publika kunveno, ke li ne rekonas la Nacian fronton rimedo la plej bona, kiu povus vivi daŭre.

Sed simile pri la ekzisto de Nacia fronto parolis ankaŭ aliaj reakciaj reprezentantoj de nia politika vivo. Precipe evidentiĝis la intencoj de reakcio, kiam oni pridiskutadis la efektivigadon de la naciigaj leĝoj. El la tiel nomataj konfiskaĵoj ili volis fari posedaĵojn de fabrikantoj, grandbienuloj kaj grandkomercistoj kaj tiamaniere malebligi al la popolo la naciigon de tiu ĉi grava produkta kaj komerca sektoro. Ĉefministro Klement Gottwald kelkfoje informis la popolon pri la reakcia manovrado de kontraŭpopolaj elementoj, reprezentataj de Dro Zenkl, monsignoro Šrámek, Dro Lettrich kaj dekstrula socialdemokrato Majer, kiuj agis kontraŭ la Nacia fronto en la nomo de siaj partioj, kvankam estis konate, ke anoj de tiuj ĉi partioj, almenaŭ la granda parto de ili, pri tia reakcia politiko kontraŭpopola tute ne konsentis. Tial la Komunista partio de Ĉeĥoslovakio avertadis la reakciulojn daŭrigi tian detruan politikon kaj vokis en la reakciajn partiojn, ke tie membraro gardu la respublikon kontraŭ la atako de reakciaj gvidantoj. La laboranta popolo de la Respubliko, sen diferenco de politikaj partioj, ekkonis, ke vere nur partio komunista defendas konsekvence la postulojn de laboranta popolo. Proksimiĝis tempo de tutŝtata elektado, kaj ĉiu povis vidi, ke komunista partio kun sia konstruktiva programo havas grandan ŝancon venki la elektadon. Tion sciis ankaŭ Dro Zenkl kaj liaj kunuloj sur la reakcia flanko kaj tial ili volis antaŭ la elektado fari radikalan ŝanĝon, apogante siajn reakciajn esperojn je la helpo de eksterlanda reakcio. La 17an de februaro estis okazonta la regula kunveno de la registaro. Ĉiuj ministroj venis, escepte de la reakciaj, kiuj anstataŭ veni kunvenon, sendis demision al la respublika prezidento Dro Beneš. Tiun ĉi paŝon ili bone pridiskutis en la loĝejo de deputito Ducháček kaj jam ĝojis, kiel komunistoj devos cedi, ĉar demisiis ĉiuj dekstrulaj reakciaj ministroj de la Nacia fronto. Ili vere bone elektis la tempon de la atako, ĉar tiutempe la 22an de februaro estis okazonta la tutŝtata kongreso de Sindikatanoj kaj poste kongreso de kampistaj komisionoj. Kvin tagojn hezitis la respublika prezidento Dro Beneš akcepti la demision de la ministroj kaj poste li decidiĝis ne akcepti ĝin. Sed estis jam malfure. La tuta popolo laboranta decidis en multaj kunvenegoj, kiujn kunvokis komunista partio, ke la demisiintaj ministroj jam ne povas reveni registaron, ke iliajn lokojn okupos kandidatoj de la partioj, unuiĝintaj en la Nacia fronto. Tuj reformiĝis la centra komitato de la Nacia fronto, kiu decidis, ke la perfindintaj ministroj estos anstataŭitaj per aliaj katolikoj, nacisocialistoj kaj socialdemokratoj, kiel tion postulis la ega subĉiela kunveno en Praha sur la Malnovurba placo. Prezidento Dro Beneš devis subiĝi al la deziro de la popolo kaj nomi novan, reformitan registaron.

Ĉio ĉi okazis surbaze de la malnova konstitucio, valida depost la jaro 1918, kaj oni ne povis aserti, ke komunistoj faris ian atakon kontraŭ la demisiintaj ministroj. Tiuj ĉi ministroj kalkulis kun tio, ke post ilia demisio devos esti registaro oficista, kiu baldaŭ nuligos ĉiujn donacojn de la revolucio el la jaro 1945. Sed ili miskalkulis, ĉar kiel ĉiam, ili tute ne atentis, ke ekzistas popolo, kaj tiu ĉi popolo en unuhora striko en la tuta respubliko montris al la reakciuloj sian forton, sian — ne!

La reakciaj ministroj kaj ĉiuj iliaj sektoroj baris la konstruadon al la respubliko sur ĉiu paŝo. Pri multaj leĝoj oni diskutis dum longaj monatoj, ankaŭ pri la nova konstitucio, kiun ili ne volis aprobi, ĉar la avantaĝojn de la revolucio, la naciigadon, la instituciojn de naciaj komitatoj, la rajton je laboro, la asekuron de laboranto. k. t. p. ili ne volis enkodigi en la konstitucion, kiel tion postulis Komunista partio de Ĉeĥoslovakio. Post ilia forlaso el la registaro dum kelkaj semajnoj oni povis pli multe konstrui kaj fari leĝojn, defendantajn la popolon, ol oni faris en multaj monatoj de la reakcia periodo. Ankaŭ la internacian kongreson de Sokol-festaro misuzis la reakcio por la kontraŭpopola provokado. Nun fariĝis Sokol organizaĵo popola, kie laboristoj estas ĉefa kadro de la gimnastoj.

Post la likvido de la komploto povis la ĉs. parlamento aprobi novan konstitucion, tiun ĉi leĝon de leĝoj: Leĝon pri novaj impostoj al komercistoj kaj kampistoj, kiuj donis al ili grandajn impostrabatojn kaj kredit-eblojn, leĝon pri batalo kontraŭ la alkoholismo, kiu celas resanigon de la nacio, leĝon pri la vivo en teatroj, kiuj fariĝas nun kultura havaĵo de la tuta popolo, leĝon pri la nacia asekuro, kiu zorgos pri la maljuniĝintaj, pri invalidoj kaj pri homoj private entreprenantaj, leĝon pri la ŝtata subteno al junaj novgeedzoj, kiu ebligas per kredito fondi kontentan familion, leĝon pri la revizio de la unua terposeda reformo, kiu nuligas grandajn bienojn kaj permesas la kampistan laboron maksimume nur ĝis 50 hektaroj. Per la divido de l'grundo oni ebligas al multaj kampistoj labori sur sia propra grundo, kiun rajtas posedi nur tiu, kiu ĝin fakte kulturas, do ne ekz. kuracistoj, profesoroj, pastroj, monaĥinoj, komercistoj ktp. Oni aprobis leĝon pri unueca lernejo, kiu ebligas, ke povas studi ĉiu infano talentita, sen diferenco de la sociala povo de la gepatroj. Havaĵo ne estas la decidodona faktoro. Ĉiu povas atingi la plej superan klerigon. Efektive ni devus nomi longan vicon da pluraj leĝoj, kiuj estis en tiu templimo de unu jaro aprobitaj de la parlamento, kio ne estis dum la reakcia sabotado ebla dum kelkaj jaroj.

Jes, la reakcio tute forgesis la fakton, ke politiko de Komunista partio de Ĉeĥoslovakio fariĝis fakte labor-programo de la tuta nacio. Reakcio volis misuzi la malbonan rikolton, la malfacilan situacion en la nutrado kaj agitis kontraŭ le registaro, kvazaŭ ĝi estus kulpa, ke estis sekega jaro 1947, kiu preskaŭ naskus katastrofon, malsaton. Sed reakcio forgesis ankaŭ, ke ni havas fidelan amikon, kiu sendis grenon ĝustatempe, ke la malsato de la ĉs. familioj estis forpelita. Tiu amiko estas nia forta aliancano Sovet-Unio, kiun nia reakcio malamis. Pli ŝate ili igus novan Munĥenon, novan nacian katastrofon, ol forlasi sakojn da mono kaj la bienojn, kiujn la reakciuloj gajnis el la laboro de la tuta laborantaro. Sed alt-kulturita laborista klaso sub la gvido de Komunista partio de Ĉeĥoslovakio mortigis la planon de reakcio tuj ĉekomence. Nun post unu jaro ni povas konstati,



*ĈS. ĈEFMINISTRO KL. GOTTWALD,*
*parolanta al la popolo en Praha, sur Malnovurba placo la 21. II. 1948.*

## PREZIDENTO GOTTWALD PAROLAS:

„Ĉeĥoslovakio deziras konservi kaj plivastigi sian komercan kontakton kun la okcidentaj landoj. Tamen ĝi defendas sin kaj defendos sin kontraŭ intervenado en niajn internajn aferojn. ĈSR havas postulon trakti surbaze de reciprokeco kiel egala kun egala. Estas bone konate, ke ĈSR estas bona komerca kliento kaj scias respekti honeste kaj sincere siajn sindevigojn. La samon ĝi postulas de la alia flanko. Tiel oni ebligas formi bonan bazon por reciproka ekonomia rilatado. Oni nepre ne povas atingi tion per diferencigado kaj intervenado." Tion deklaris la prezidento de la Ĉs. respubliko Klement Gottwald al redaktoro de la norvega ĵurnalo „Verdens Gang" Eiden, al kiu li konsentis intervjuon. — Demandite de la norvega ĵurnalisto, kiajn eblecojn de manifestiĝo havas en la nuna Ĉeĥoslovakio la homo, kiu ne konformiĝas al la ĉeĥoslovaka registaro, la prezidento respondis: „La nova ĉeĥoslovaka popoldemokrata konstitucio garantias al ĉiu civitano sen diferenco liberon de pensesprimo. Ĉiu ĉeĥoslovaka civitano povas esprimi sian opinion parole, prese aŭ alimaniere sen antaŭtimo, ke lin renkontos malutilo, kompreneble: kiam li ne transpaŝas la limojn, fiksitajn de leĝoj, kiuj celas protekti interesojn de la popolo, nacio kaj ŝtato. Kaj fine ĉiu civitano, ankaŭ tiu nekonsentanta pri la nuna ĉeĥoslovaka reĝimo, povas manifesti sian opinion en elektoj, ĉar la konstitucio garantias al ĉiuj civitanoj universalan, egalan, rektan kaj sekretan balotrajtojn. Tiel estis ankaŭ dum la lastaj elektoj por la parlamento, ĉe kiuj la civitanoj, ne konsentantaj pri la registaro, povis starigi propran — opozician kandidatliston." — La demandon, kiujn ĉef-erarojn faras — laŭ la opinio de la prezidento — eksterlandaj kritikantoj koncerne la samtempan situacion en Ĉeĥoslovakio, Klement Gottwald respondis jene: „La ĉefa eraro, kiun faras eksterlandaj kritikantoj, prijuĝante la reĝimon en Ĉeĥoslovakio, estas, ke ili malatentas aŭ ne volas atenti pri la ĉeĥoslovaka popolo kaj ties pensmaniero, ke ili malatentas aŭ ne volas turni sian atenton al la fakto, ke nepra kaj frakasa plimulto de la ĉeĥoslovaka popolo konsentas pri la nuna reĝimo kaj plej ofereme kaj entuziasme laboras pri konstruado de sia respubliko. Tiu ĉi fakto pruvas ja tion plej gravan, nome, ke la nuna reĝimo en Ĉeĥoslovakio estas esprimo de la popolvolo kaj verko de la popolo." — Demandite, ĉu la nunaj malkonsentoj inter Oriento kaj Okcidento estas tiel gravaj, ke pli aŭ malpli frue ili sekvigus militkonflikton, prezidento Klement Gottwald respondis laŭvorte jene: „Mi denove ripetas mian konvinkon, ke neniu granda konflikto okazos en la proksima tempo, per kiu minacas imperialistaj militinstigantoj. Tro freŝaj estas la teruraĵoj de la lasta milito kaj tro grandaj estas la pacofortoj, ol ke aventuraj sopiroj de imperialistoj superu ilian prudenton kaj sencon por realo.". — La prezidento fine respondis al la redaktoro de la norvega jurnalo Verdens Gang demandon pri la celoj de la ĉeĥoslovaka kvinjara plano kaj pri progresoj de la ĉeĥoslovaka naciigita industrio postfebruara: „La celo de la ĉeĥoslovaka kvinjarplano estas plialtigadi la vivonivelon de la ĉeĥoslovaka laboranta popolo. La ĉefa parto de la kvinjara plano estas la peza maŝinindustrio, ĉar tio respondas al la ĉeĥoslovakaj eblecoj k bezonoj kaj utilos plej bone al evoluigo de la tuta ĉeĥoslovaka ekonomio. ĈSR naciigis 95% de la tuta industrio. Tio estas firma bazo. Krom tio naciigitaj estas: la financoj kaj la eksterlanda komerco. Grava estas la naciigita parto de la ĉeĥoslovaka podetala komerco. Krom etaj esceptoj la tuta ĉeĥoslovaka transportado estas naciigita. Ni superas ĉiujn malhelpojn en nia vojo. La mova forto de la ĉeĥoslovaka ekonomio ne estas profito de unuopuloj sed prospero de la tuta nacio. La naciigo manifestis sin pro tiu kaŭzo kiel potenca faktoro por konsolidigo de la ĉeĥoslovaka ekonomio. Dank' al la ĉs. naciigita ekonomio kaj kompreneble ankaŭ al senprofita kaj amika helpo de USSR, Ĉeĥoslovaka respubliko superis la tre malbonan rikolton en la j. 1947. Krom tio ĈSR havas ekvilibran budĝeton kun egalpeza bilanco de sia eksterlanda komerco. La ĉeĥoslovaka naciigita ekonomio ebligas al ni helpi nin kaj iri antaŭen per propraj fortoj."

kiel ĝuste la respublika prezidento Klement Gottwald, tiam en la funkcio de registara prezidanto, taksis la situacion kaj heroldis en la tutan nacion: „Popolo, gardu vian liberecon! Hejma reakcio kun helpo de reakcio ekstera volas murdi ĝin!“ Kaj nun la tuta laboranta popolo vere bone vartas tion, kion ĝi per sia sango en la pasinteco devis tiom pagi: la liberecon, la sendependecon, sian laboron kaj ĝiajn donacojn. La respubliko apartenas al la popolo, la popolo al la respubliko kaj ne al fabrikantoj, grandbienuloj. La atako, kiun la reakcio faris en decembro 1920, kiam pro malunueco de laboristaro ĝi venkis, antaŭ unu jaro tute fiaskis. Se ni konsideras la leĝojn, kiujn la popolo jam efektivigis kaj ĉiujn ceterajn leĝojn postfebruarajn, kiujn la reakcio tiom sabotis, kaj precipe la leĝojn, per kiuj estis naciigitaj 92% da bankoj, asekurinstitutoj, minejoj, industriaj entreprenoj, poste la leĝojn, per kiuj estis efektivigitaj la kontraktoj kun ĉiuj slavaj kaj popoldemokratiaj ŝtatoj, kiuj nun reprezentas potencon de pli ol 250 milionoj da homoj, kio faras digon kontraŭ la faŝismo-imperialisma atakemo, ni devas konfesi, ke tiu ĉi laboro estas la plej sekuriga vojo, kiel veni al socialismo, al pli feliĉa, pli justa morgaŭo kaj sincera kunlaboro de honestaj nacioj sur principo egala kun egala, al pura kamaradeco de ĉiuj laborantaj homoj sur la mondo. Tial devas sur la tuta mondo ĉesi la malmorala sistemo kapitalista, ke homo povas ekspluati homon. La venko de ĉs. laboranta popolo super la reakcio estu modelo al la tuta laborantaro en la mondo!

## ĈS. MINISTRO PASTRO PLOJHAR PRI ĈS. MILITISTAJ PASTROJ

Ĉs. militistaj pastroj restos fidelaj al la ĉs. popolo. La 18an de februaro okazis en Praha kunveno de ĉiuj militistaj pastroj el la tuta Ĉs. respubliko, por aŭdi la referaton de ministro por la publika sano pastro Plojhar, kiu pritraktis en sia parolo multajn problemojn, tuŝantajn la militistajn pastrojn. La ministro unuavice akcentis la fakton, ke ĉeĥoslovakia registaro en la socialaj linioj de sia politiko kaj en subtenado de la publika sano direktas sin humanece kaj ne per sistemo de kalkulado, kiun ni vidas en la kapitalistaj ŝtatoj. La tasko de la pastroj estas — diris ministro Plojhar — misio interpreti al la popolo la veron, liberecon, justecon, fratecon kaj ebligi al ĝi honestan vivon, precipe vivon animan, kiun ili devas plifortigi. Tiu pastro, kiu forlasas sian paroĥejon kaj fuĝas trans la ŝtatlimoj estas perfidulo je la ŝtato kaj nacio. Fine akcentis pastro ministro Plojhar la grandan liberecon, kiun ĝuas ĉiuj eklezioj en Ĉeĥoslovakio, kaj diris, ke, se tamen iu pastro troviĝis kun la estantaj leĝoj en konflikto, do certe tio ne okazis pro lia pastra misio kaj servo, sed tute certe pro ia kontraŭŝtata, kontraŭpopola agado. La partoprenantoj al la tutŝtata konferenco de militistaj pastroj sendis saluttelegramon al la respublika prezidento Klement Gottwald, en kiu ili dankas al li por la laboro, farita je bono de ĉs. popolo. En la saluttelegramo ĉiuj militistaj pastroj promesas al la respublika prezidento, ke ili sekvos la vojon, kiun li montris al la nacio, kaj sur siaj lokoj laboros en akordo kun la popoldemokratiaj principoj, gvidantaj al feliĉa socialista estonteco de ĉs. popolo.

## VIZITU ĈEĤOSLOVAKION!

Dezirante viziti fremdan landon, oni estas interesata antaŭ ĉio pri la vojaĝ-komuniko por veno kaj reveno kaj la ebloj de la trafiko en la interno de la respektiva ŝtato. Estas kompreneble, ke la moderna vojaĝanto preferas la modernan transportilon — aviadilon. Do, kiel aspektas la trafik-situacio en Ĉeĥoslovakio, en la koro de Eŭropo, en la lando de mondfamaj banlokoj Karlovy Vary, Mariánské Lázně, Piešťany, Luhačovice, Poděbrady, kun centroj de la internacia turismo kaj kun sportocentroj, kun siaj arbaroj, lagoj kaj riveroj, kun sia folkloro, konata industrio kaj agrikulturo? — La ĉeĥoslovaka aer-transportado estas unu el la plej malnovaj en Eŭropo. Ĝi estis fondita jam en la jaro 1923 kaj reprezentata de la Ĉeĥoslovakaj aerolinioj. La ekspansio de la aviado kaj pliiĝanta prefero por tiu speco de transporto eldevigis jam en 1927 fondi pluan kompanion — Ĉeĥoslovakan kompanion por aerotransportoj. La entreprenoj laboris antaŭ la milito al plena kontenteco de la pasaĝeroj, kaj ili akiris k meritis bonan nomon en la internacia forumo. Ilia agado estis interrompita de la germana okupado en 1939, kiam la plejparto de la personaro foriris eksterlanden, por pruvi precipe en la aerbataloj pri Granda Britujo sian teknikan kaj moralan valoron kaj por kontribui al la venko de la Aliancanoj. Sed tuj fine de la dua mondmilito la aktiveco de la ĉeĥoslovaka aertransportado estis renovigita kaj oni fondis la entreprenon Ĉeĥoslovakaj aerolinioj, kiu praktikas monopole la transportadon en ĈSR kaj reprezentas ĝin kiel unusola reprezentanto en la eksterlando. La aviadista personaro, kiu ne perdis, male akiris en la milito pluajn riĉajn spertojn, estas garantio, ke la antaŭmilita tradicio estos daŭrigata. — Jam la unuaj postmilitaj rezultoj indikis, ke la prefereco de la aervojaĝado kreskas. En 1 946 la aerolinioj traflugis 1,750.000 km kaj transportis 60 mil pasaĝerojn, en la 1947 jaro ili traflugis jam 5,162.000 km kaj transportis 135.149 pasaĝerojn.

La jubilea jaro 1948 indikas per siaj rezultoj pluan supreniron. Dum la unuaj monatoj de la jaro oni traflugis 3 milionojn 406 mil km k transportis 65.304 vojaĝantojn. El la internaciaj linioj de la ĉeĥoslovakaj aerlinioj funkcias flugkomunikoj al Varsovio, Kopenhago, Oslo, Stokholmo, Helsinki, Amsterdamo, Bruselo, Londono, Parizo, Zürich, Romo, Ateno, Istanbulo, Kajro, Hajfo, Bejruto, Beograd, Zagreb, Sofio, Zadar, Budapeŝto, Bukuresto kaj Berlino. La enlandaj aerlinioj estas tiel dividitaj, ke ili interkomunikigu la regionojn de ĈSR, gravajn por la ekonomio kaj turismo, por ke la eksterlanda vizitanto ne perdu la tempon per longdaŭra surtera vojaĝado kaj havu al sia dispono ĉian komforton, vojaĝante tra interno de la lando. Inter la plej gravaj komunikoj estas tiu en la okcidentan Bohemion, kun la konataj banlokoj kiel ekz. Karlovy Vary kaj Mariánské Lázně, plue al Liberec en la norda Bohemio, kiu havas ĉe ni la saman rolon kiel en Anglio Manchester, kaj České Budějovice en la sudo; orientaj komunikoj direktiĝas al moraviaj urboj Ostrava, Olomouc, Kroměříž, Brno kaj al la ĉefurbo Bratislava en Slovakio. Bratislava situas sur la centra interna linio Praha—Brno—Bratislava—Košice. Tiu ĉi linio kun la plilongigo en la direkto al Karlovy Vary trapasas horizontale la tutan Ĉeĥoslovakion kaj formas akson de la aviado, al kiu ligiĝas la ceteraj centroj per mallongaj linioj. La slovakaj banlokoj kaj la celo de miloj da turistoj, el la en — kaj eksterlando, la montaro Altaj Tatroj, havas aer — komunikadon kun Praha aŭ tra Brno—Piešťany—Sliač, kiu estas ankaŭ konata banloko, aŭ tra Bratislava — kaj Sliač.

Do preferu uzi la servon de la Ĉeĥoslovakaj aerolinioj, vojaĝante tra ĈSR. Vi vojaĝos rapide kaj sekure. Do venu al ĈSR dum la Internacia muzikfestivalo, nomata „Printempo de Praha“, kaj la aŭtuna foiro de Praha.

### *REVOLUCIA POEMO DE ĈEĤA ELSTARA POETO K. H. MÁCHA:*

*(Aŭtoro de poemo „Majo“ — nask. 16. 11. 1810, mort. 5. 11. 1836)*

*Kial krii, ke mi domon ŝiras,*
*kiu mem jam baldaŭ devus fali?*
*Se la fundamenton mordas rato,*
*se la domon jam balancas vento,*
*se al ter'kliniĝas la tegmento,*
*ĉu la domo taŭgas por loĝado?*
*Se ni volas fari rekonstruon,*
*ĉu ja povas ni sen embaraso*
*ĝin masoni sur la sama bazo,*
*kiu kaŭzis ĝus la domdetruon?*
*Eĉ la bazon do elĵetu oni,*
*por ĝin tute nove elmasoni!*

*(Tradukis Dr Theodor Pumpr.)*

### NI KOMENCIS SUKCESE!

Ni finis la dujaran planon sukcese. Jam la komenco de la 5-jara plano estas esperodona, ĉar unuopaj sektoroj dum januaro 1949 plenumis la planon je 98.9% ĝis 117.1%. Jen la unua tabelo en procentoj:

| Industria sektoro | Januaro | | | Decembro |
|---|---|---|---|---|
| | 1949 | 1947 | 1948 | 1948 |
| Industrio ĝenerale (sen nutrad-sektoro) . . . | 101.8 | 104.9 | 103.6 | 107.2 |
| minej-industrio . . . . | 99.5 | 104.8 | 100.1 | 100.4 |
| forĝ-industrio . . . . | 105.4 | 112.8 | 108.7 | 100.9 |
| metalurgio . . . . . | 98.9 | 109.0 | 97.9 | 117.7 |
| energio-produktado . . | 102.9 | 100.1 | 97.3 | 100.7 |
| kemia industrio . . . . | 100.4 | 79.0 | 109.9 | 120.3 |
| vitroindustrio . . . . | 94.7 | 93.8 | 124.5 | 111.3 |
| konstrua - materialo . . | 117.1 | 95.1 | 139.6 | 121.2 |
| paperproduktado . . . | 96.7 | 99.0 | 109.5 | 97.3 |
| lignoproduktado . . . | 93.2 | 98.6 | 106.1 | 94.9 |
| teksa k vestada industrio | 102.5 | 112.1 | 91.5 | 96.6 |
| ledo- k gumoindustrio . . | 98.8 | 103.3 | 103.2 | 132.8 |
| gramofon- k filmindustrio | 110.1 | — | — | — |

### ĈEĤOSLOVAKA ARTA GLITKURANTINO ALENA VRZÁŇOVÁ

fariĝis mond-ĉampionino en la tutmonda konkurso en arta glitkurado, aranĝita en Parizo Vrzáňová antaŭis tre klare la ceterajn kandidatinojn. La pariza publiko kaj la franca gazetaro rekonis la neatenditajn rezultojn de la ĉeĥoslovakia glitkurantino Vrzáňová.

### ĈEĤOSLOVAKIO-TUTMONDA MAJSTRO SUR GLACIO.

Ĉs. unuigita nacia fiskulturo festis en la lastaj semajnoj la sukcesojn de vintra sporto surglacia. Grupo de ĉs. hokeistoj venkis en la tutmonda majstrecturniro de surglacia hokeo en Stockholmo. Post la venko la ĉs. nacia grupo sendis al la respublika prezidento Klement Gottwald la jenan telegramon: „Estimata sinjoro prezidento! Nacia hokeo-trupo raportas, ke ĝi plenumis sian taskon,

Matějka — Loos — Vodička.“

La respublika prezidento respondis al la majstroj de la mondo per la jena telegramo: „Mi dankas vin kore pro la ĝojiga telegramo, per kiu vi anoncis al mi, ke vi honeste plenumis vian taskon. Al via brila venko mi gratulas, ĉar ĝi denove glorigis nian respublikon.

Gottwald.“

**Jen la rezulto:**

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1. Ĉeĥoslovakio . . . . . . | 5 | 4 | 0 | 1 | 21:6 | 8 |
| 2. Kanado . . . . . . . | 5 | 2 | 2 | 1 | 20:10 | 6 |
| 3. Ameriko . . . . . . . | 5 | 3 | 0 | 2 | 23:16 | 6 |
| 4. Svedujo . . . . . . . | 5 | 2 | 1 | 2 | 26:12 | 5 |
| 5. Svisujo . . . . . . . | 5 | 2 | 1 | 2 | 18:17 | 5 |
| 6. Aŭstrio . . . . . . . | 5 | 0 | 0 | 5 | 5:52 | 0 |

### ESPERANTISTOJ-ĴURNALISTOJ BONVOLU LEGI!

La redakcio de „Esperanto-Servo“ sendos al Vi ĉiun kvanton de sia organo, se vi skribos al „Esperanto-Servo“, Praha II., Malá Štěpánská 7, Ĉeĥoslovakio. Ni estos al Vi dankemaj, se Vi uzos kelkajn artikolojn en vialanda preso kaj post la represo sendos unu ekzempleron al ni. Ne forgesu ĉiam akcenti la fonton de la raporto t. e. *„Esperanto-Servo, Praha“*, por kio ni jam antaŭe dankas.

### ĜENERALA SEKRETARIO DE LA TUTMONDA SINDIKAT-FEDERACIO SAILLANT EN PRAHA.

En Praha kunvenis kun ĉeĥoslovakaj k eksterlandaj ĵurnalistoj sinjoro Saillant, kiu priskribis al ili la iradon de la lasta kunsido de la plenumkomitato federacia. Saillant substrekis precipe la fakton, ke la pariza kunsido ekzamenis, kiel estis plenumitaj la devigaj decidoj kaj rezolucioj, akceptitaj en kunsido de la ĝenerala konsilantaro de la Tutmonda sindikat-federacio en 1947 en Praha. Saillant parolis poste pri kreskado de la sindikata movado. Li citis, ke la Tutmonda sindikat-federacio havis en la momento de sia fondo 65 milionojn da membroj. La 1-an de januaro 1949 la stato altiĝis al 76 milionoj, ne enkalkulante la germanajn kaj japanajn sindikatojn, kiuj ankaŭ estas jurvalidaj membroj de la Federacio. Saillant poste esprimis konvinkon, ke ekzistas tre multaj membroj en Usono kaj Granda Britujo, kiuj deziras, ke la Tutmonda sindikat-federacio daŭrigu sian pacan mision kaj sian ekonomian kaj socialan agadon.

● En la balta haveno Szciecin transdonis Poloj la kajon de Dembicki, kiu servos al ĈSR kiel varotransitejo. Jam nun oni komencis rekonstrui la kajon por la nomita celo. El Ĉeĥoslovakio estis jam liveritaj grundajoj de Larsen kaj meze de marto oni jam enmetos la ferobetonajn kolonojn.

● Ion por la eksterlandaj filatelistoj. La ĉeĥoslovakaj poŝtoj eldonis okaze de la unua datreveno de la februaraj okazintajoj en Ĉeĥoslovakio ĉeokazan poŝtmarkon brunruĝan en valoro de tri kr. La marko enhavas portreton de la respublika prezidento Kl. Gottwald, kiel li konigas al la popolo konsistigon de nova registaro.

● Enkonduko de libera vendado de teksaĵoj, piedvestoj, de superrestaj lakto, butero, ovoj kaj kortbirdaro, la deblokado de pluraj ŝatindaj nutraĵo-specoj, kiel ekz. de kafo, rizo, teo, ĉokolado, denove estas dokumento pri sukcesoj de la ĉeĥoslovaka konstruado dum la 2-jara plano kaj ankaŭ de la tuta planata ekonomio, kiu daŭre levas la vivonivelon de la laborantaj per justa rekompenco.

● 31 vendejoj de la nacia entrepreno nutraĵ-distribua „Pramen“ (Fonto) komencis jam liberan vendadon de nutraĵoj en la tuta Respubliko. Intereso pri tiu ĉi senkupona varo estas granda. La stoko da varoj estas bone provizita. La varo estas bonkvalita kaj estas vendata por pli altaj prezoj ol la porciumata varo.

● Ĉeĥoslovakio ne estas blinda rilate al diferenciĝado fare de la brita kaj usona administrantaro en Germanio. Ĉeĥoslovaka delegito deklaris en kunveno de la nutraĵdistribua komitato ĉe la ekonomia komisiono por Eŭropo, ke la reprezentantoj de la brita kaj usona administro en Germanio, kiuj distribuas en Parizo malnovan feron el la okcidenta duzono, eliminas el atribuo tute senkaŭze Ĉeĥoslovakion, Hungarion kaj la popoldemokratajn ŝtatojn de la orienta Eŭropo.

● La unua monato de la ĉeĥoslovaka kvinjara plano estis sukcese plenumita per 101,8%. La sukceson ebligis bona preparo, vasta laborkonkurado inter la laborantoj k uzinoj kaj ĉiam plimultiĝantaj plibonigaj sugestoj. La plano estis plej bone plenumita de la industrioj ceramika, gramofona kaj filma, metalurgia, energio-produkta, vestaĵa kaj kemia. Nur ono da procento mankas por centprocenta plenumo de la plano en la minado, kiu atingis 99,5%; same honoran lokon akiris ankaŭ la maŝinindustrio, plenuminte la planon per 98,9%, kaj la ledokaj gumo-industrio per plenumo de la plano je 98,8%.

● La episkoparo de la romkatolika eklezio en ĈSR prezentis antaŭ kelka tempo memorandumon al la respublika prezidento Klement Gottwald, en kiu ĝi esprimis sian vidmanieron pri aktualaj aferoj, kiuj koncernas la romkatolikan eklezion. — En Praha kunvenis por antaŭkonsiliĝo komisiono por aferoj de la religio kaj eklezio, starigita ĉe la centra agokomitato de la nacia fronto, por remalfermi traktadon pri ekleziaj aferoj de la romkatolika eklezio en ĈSR. La konferencon, prezidatan de la ministro de justeco dro Čepička, partoprenis reprezentantoj de la ĉeĥoslovaka registaro kaj delegitoj de la romkatolika episkoparo.

● Ennaturan libertempon, aranĝatan de la ĉeĥoslovaka centra konsilantaro de sindikatoj, partoprenis dum la pasinta jaro sume 130 mil 548 laborantoj. Vintran refreŝigan libertempon en la plej bonaj montar-centroj partoprenis ĝis nun 21 mil laborantoj. Refreŝigejoj por la laboranta junularo estis riĉe ekipitaj per artikloj de vintra sportado. Ankaŭ la libertempado en eksterlando estis plej multnombra dum la pasinta jaro; 5 mil 500 ĉeĥoslovakaj laborantoj pasigis sian libertempon en Pollando kaj ĉe la Nigra maro en Bulgario. 9 kulturaj kolektivoj estis senditaj eksterlanden. Ĉiujn refreŝigajn aranĝojn de la sindikata movado partoprenis dum la pasinta jaro sume 130 mil 548 laborantoj. Tiu ĉi ennatura ripozo estas ebligata al la ĉeĥoslovakaj laborantoj kontraŭ nealta pago: la labor-merituloj ricevis senpagan ripoz-restadon.

● La 21-an de februaro, estis aranĝita Internacia tago de solidareco de la junularo kun tiu en la koloniaj lando. La „tago“ estis samtempe datreveno de ribelo de indiĝena maristaro en Hindujo, kiu stariĝis en la frunton de la tiea liberiga movado. Tio okazis ĝuste antaŭ tri jaroj, en la j. 1946. Ankaŭ laboristoj kaj studentaro aliĝis al la ribelo, en kiu centoj da ili oferis siajn vivojn en batalo kontraŭ enkolonia subpremado. — La senco de la 21-a de februaro estis krej premisojn por komuna procedo de la demokrata junularo, ĉar de Pejpin ĝis Vieno, de Rio ĝis la sudafrika Durban la junaj progresemaj homoj batalas por la samaj rajtoj k idealoj.

Ĉiujn dezirojn kaj proponojn bonvolu adresi al: „Esperanto-Servo“, Praha II, Malá Štěpánská 7, Ĉeĥoslovakio, telef.: 330-14. Eldonas: Instituto de Esperanto-Servo-Praha. Responda reprezentanto de Esperanto-Servo: A. Malík, prezid. de IES. Presis: Státní tiskárna (Ŝtata presejo) Praha, Ĉeĥoslovakio.